WIKIPEDIA

Novzelanda signolingvo

La **novzelanda signolingvo** (angle *New Zealand Sign Language*, NZSL, maorie *Te Reo Rotarota*) estas signolingvo uzata en Nov-Zelando. Temas pri la unua aŭ preferata lingvo de proksimume 24 000 surdaj homoj en Nov-Zelando. La lingvo utiligas spacon kaj engaĝas movojn kaj aranĝojn de la manoj, korpo, vizaĝo, kaj kapo. Multaj miloj da homoj kiuj estas ne surdaj ankaŭ uzas *NZSL*, kiel parencoj de surdaj homoj, signolingvaj interpretistoj kaj tiuj, kiuj havas alian kontakton kun la novzelanda surda komunumo.

Kiel la signolingvo uzata en Aŭstralio, Auslan, ĝi evoluis el la brita signolingvo de la 19-a jarcento, kaj retenas la saman manlibran alfabeton, gramatikon, kaj similan vortprovizon. *BSL*, *Auslan* kaj *NZSL* kune povas nomiĝi *BANZSL*.

Novzelanda signolingvo

angle New Zealand Sign Language (NZSL)

maorie Te Reo Rotarota

Parolata en	Nov-Zelando
Parolantoj	20 200
Signantoj	ĉ. 24 000
Lingvaj kodoj	
Lingvaj kodoj	
ISO 639-2	sgn-NZ
ISO 639-3	nzs
Glottolog	newz1236
Angla nomo	New Zealand Sign Language
Franca nomo	langue des signes néo-zélandaise

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Novzelanda_signolingvo&oldid=5167139"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 23:46, 4 apr. 2013.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.